*Frivola Revuo Efemera kun Ŝokantaj Obscenaĵoj*

**N-ro 3 (46)**

# FREŜO





**La februaro 2017j**

*La retro*... eros ĉiumonate,
*nur por*... mi firman volon prepari ĝin :-)

**Luty 2017 r.**



## Tss... mi trovis al vi en TTT-ejo !

*Jen skribis la (FREŜ-)legantoj*

Estimata Marian,
Mi sukcese lanĉis programon kaj mi trafoliumis vian retrevuon.
Mi gratulas freŝecon kaj junecon.
Sendube ĝi plaĉos por gejunuloj.

Stanislao Rynduch

Bedaŭrinde ĝi ne plaĉas al mi. Ĝi estas evidente obscena. Eĉ viroj, al kiuj mi sendis retrevuon ne estas ravitaj.

D.B.

Kara
Mi ne povas elsulti vian revuon. Cxu vi povas sendi rekte al mi?
Mi donacas al vi la retan version de la revuo Tra la mondo. BV elsxulti cxe
http://www.elerno.cn/elibro/Tra-la-mondo(reta).pdf
kore

Trezoro Huang Yinbao
Redakcio de Tra la mondo
Esperanto-Centro Ora Ponto

Estimata!
Mi elkore dankas al vi pro senditaj retligiloj al viaj bultenoj. Mi disendis ilin al miaj esperantaj geamikoj.
Amike,

Anton Mihelic - SLOVENIO

Mi tre dankas vin pro la regalo de via belega revuo. Mi volus ricevi gxin printebla senfarbe, cxar estas multekosta la presado kolorigita.
Gratulojn pro la humorajxoj kiuj karakterizas vian tre simpatian gazeton.

Cxiam "ad majora"!
Korajn salutojn
**Pino Lalli -** Italio

Feliĉe mi estas jam pli aĝa ol 18: alikaze mi ne havus la rajton legi "FREŜOn" 2-45.

**Urlich WILKE - Germanio**

Kara S-ano Marian ZDANKOWSKI

Nome de la teamanoj de E-fako de Legio de Bona Volo, ni dankas Vin pro tiu informo pri aperigo de via retrevuo.

Plej amike, frate,
Maria Aparecida da Silva

**Tre bona revuo.**
Dankon,

Jorge Purgly
Brazilo

Kara Marian,
Mi publikigis la ligon en Facebook !!
Kompreneble cxion kion vi faras, placxas al mi. Do ankau la retrevuo FRESXO !!

Kore
Bernardo MAURER - Germanio

Kara Marian!
Saluton al vi.
Mi tralegis viajn du Freŝajn numerojn.
Dankon pro kelkaj ekridoj.

Amike,
João José Santos

Elkoran dakon, tre interesa revuo, alia karaktero, tre necesa por cxiuj agxoj,

amike
Bardhyl SELIMI - Albanio

Kara Marian,
multan dankon pro via interesa ĵurnalo!
Mi minimume komprenas la historion de la homaro – du aferoj estas emfazitaj: amorado kaj mortigado, ŝajne eterne aŭ minimume ĝis la fino de la homaro.
La dinosaŭroj, mi supozas, ekzistis pli longe ol la homaro estos.

**Ververe tre freŝa ĵurnalo!**
Elkore,
Ronaldo SCHINDLER, Germanio

Atentu, satiro!!!
saluton karaj geamikoj,
jen ege interesa satira-humora revuo en Esperanto, vi povas ĝin voki per lasta simbolvorto de tiu teksto.

Achtung: Satire!!!
Liebe Freunde, anbei die Satire-Zeitschrift "FREŜO" aus Polen.
Zu öffnen über das Kennwort am Ende des Textes.

Kore, Verner PFENNIG, Germanio

**https://goo.gl/TnY1zj**

Interesa kaj amuza. Notu min kiel leganto.
Dankon, Mi salutas.

Jadwiga zakrzewska

*Frivola Revuo Efemera kun Ŝokantaj Obscenaĵoj*

# FREŜO

**N-ro 3 (46)**

**La februaro 2017j**

La retrevuo estos senpaga nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin

Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin

**Luty 2017 r.**



N-ro 3 / (46)

*Gramatikon mi ne konas kaj gazetojn ne abonas...*

*"ESTAS MI ESPERANTISTO" - Julio Baghy*

Se vi volus elŝuti antaŭajn numerojn de "FREŜO"
kaj kontroli nombron da elŝutoj ĝis nun
kaj spekti el kiuj landoj
musklaku unu el subajn ligilojn
aŭ engluu en la ĝustan lokon en retumilo

**https://goo.gl/#analytics/goo.gl/TNJo7O/all_time**
**https://goo.gl/#analytics/goo.gl/TnY1zj/all_time**

FREŜO nr: 1/44 **https://goo.gl/TNJo7O**
(ĝis hodiaŭ - 600 elŝutoj)
FREŜO nr: 2/45 **https://goo.gl/TnY1zj**
(ĝis hodiaŭ - 400 elŝutoj)
-------------------------
*Se vi havus proponojn, materialojn por la venonta numero de ĉi revueto - skribu al mi:*

**fresxo@protonmail.com**
Skajpo: **marianzdankowski**















**Kunlaborantoj:**

*Eduardo KOZYRA*
*Adam FRENSZKOWSKI*
*Franciszek WITUCKI*
*Andrzej GIELERT*
*Mirka KUBICKA*

Recenzoj:
pri "FREŜO" ĉiam atendataj
*Mi petas kritiki -*
*speciale pro gramatikaj eraroj :-)*

*Se vi volus, ke ĉi-tiun belegan revueton ricevadu viaj geamikoj - sendu al mi iliajn ret-adresojn:*

**fresxo@gmail.com**
**fresxo@protonmail.com**

*Ĉefredaktoro:*
**Marian ZDANKOWSKI**
*poŝtel. +48 622 115 650; +48 (0) 604-079-141*

*Adreso: str. Limanowskiego 36 m 3,*
*10-343 OLSZTYN, POLLANDO*
*retadreso:* fresxo@protonmail.com
*Skajpo:* **marianzdankowski**

*Se vi volus instigi min ne nur pervorte (perforte):*

Bankokonto:
(IBAN) n-ro: PL 54114020040000380246602778
Ricevonto: Marian ZDANKOWSKI
Ricevontadreso:10-343 Olsztyn; Limanowskiego 36/3
BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK
Bankadreso: BRE Bank S.A. INTERNET BANKING,
al. Pilsudskiego 3, 90-368 Lódz
SORT CODE: 11402004
Konto ĉe UEA: mzda-e

**Grave:**
*mi povas gvidi kvizo(j)n dum via E-aranĝo !*
*Vi kontaktiĝu min rilate al ĉi afero !*

La ilustraĵoj estas belaj brilantaj lanĉita altiri la atenton de ĉiuj. Ĝi estis pentrita fare de juna artisto Sankta (Bui Hai Binh), kiu tiris la kovrilon kaj ilustrita multajn librojn por la ĉina lingvo. Kvankam Sankta aserto havas esploradon kaj lerni antaŭ fari, sed la ilustraĵoj ankoraŭ ricevi multajn kritikojn fare de la leganto kiel kostumo aspektas tro kiel Ĉinio. Tran Quang germanaj esploristoj diris ke ŝtonumado ne elkuri pro la fakto ili ne havas evidentan fonton scii vesti de Vjetnamio pli ol 500 jaroj. Sed eble tiu estas ankaŭ leciono por la juna artisto Sankta Sankta, ĉar ĉiuokaze la bildon plenigxis de la odoro de la ĉina lingvo libroj.


## Al la ĉefredaktoro skribas:


**Dankon pro via sendo!**


Nu, kion diri? Mi ne havis tempon antaŭe por trarigardi la 1an numeron, tial preskaŭ mi svenis ekvidante la unuajn paĝojn de la dua FREŜO!
Ho, ho fotoj pri belulinoj kiuj certe pliklarigos la vidkapablon de multaj viroj! Sed nur belulinoj?!? Kiam videblos beluloj? Mi ja sciis, ke vi estas ŝercema, kaj do kelkaj ŝercaĵoj estis vere bonaj, taŭgaj por forigi la grizecon au eĉ nigrecon de niaj tagoj. Pro tio vi estu dankata (au dankita?).
Kiel dirite mi ne havas tiom da tempo eĉ ne por legi, plie mi ŝatas legi la paperaĵojn (mi apartenas al ege malnova generacio, mi dirus prageneracio, tial mi preferas havi ion en la manoj - ne miskomprenu min! - kion eblas trafoliumi).
Por la momento estas ĉio, kiam mi estos elleginta la tuton, mi sendos al vi - eble! - aliajn komentojn.


Amike,
Elda Doerfler
Germanio

# Jen ordonis religio...







Aztekaj dioj




**Tlaloko** - la dio pri pluvo kaj pri fekun-deco;
**Xochiquetzal** - la unua edzino de Tlaloko
**Chalchiuhtlicue** - "La Jadjupulino" diino, la dua edzino de Tlaloko

# Esperanto en Ĉinio

*Liu Xiaozhe (Solis)*

**La Esperanta movado en Ĉinio estas grava parto de tiu en la mondo.**
Sed oni troigas ĝian skalon. Laŭ takso, nun en Ĉinio estas malpli ol 1000 homoj, kiuj povas paroli Esperanton en diversaj niveloj. Sciu, ke en Ĉinio estas pli ol 1406 milionoj da loĝantoj, **nome estas nur 1 (unu) parolanto de Esperanto el miliono da ĉinoj!**

Esperanto estis enkondukita al Ĉinio ĉirkaŭ la jaro 1900. Ĝis nun (jaro 2016) , esperanto dufoje prosperis en Ĉinio. La unua fojo okazis ĉirkaŭ **1912–1936**, kiam ĉinaj intelektantoj komencis akcepti eŭropajn penson kaj kulturon. La tiama ministro de la Edukado, sinjoro Cai Yuanpei, kaj multaj aliaj famaj intelektuloj varme subtenis Esperanton. La dua fojo okazis ĉirkaŭ **1981–2005**, kiam la ĉina registaro komencis ŝanĝi sian ŝtatan izolecon. La popolo, katenita de la komunismo de pli ol 30 jaroj, montris grandajn interesojn al la ekstera mondo. Ili komencis lerni la fremdajn lingvojn, inkluzive Esperanton, por lerni avangardajn sciencon kaj teknikon de alilandoj, ĉefe de Usono kaj Eŭropo.

El la retrevuo TRA LA MONDO eldonita de Trezoro Huang Yinbao

**Laŭdire, tiam la lernantoj de Esperanto superis 800 mil.** Bedaŭrinde, malmultaj floroj fruktis.



Por ĉinoj, fakte Esperanto ne estas tiel facila kiel la subtenantoj propagandas. Ne kapable posedinte la lingvon, plejparto de la lernantoj foriris de Esperanto. Mi okazigis kelkajn kursojn en universitatoj en Urumqi, la ĉefurbo de la regiono Xinjiang, sed nur 1 kursano esperantistiĝis.

**En jaro 1978**, ĉina komunista partio komencis ekonomian reformigon, kio altigas la vivan nivelon de la popolo. Sed la partio ne volas ŝanĝon je la politiko, do ĝi kondukas la intereson de popolo al la ekonomia profito. La troa ĉasado al la mono rezultas, ke ĉinoj perdas la aspiron al la idealo kaj spirito. Tial multaj homoj perdis la intereson al Esperanto, kiu ne povas alporti al si ekonomian efikecon. Do restas en la Esperanta grupo nur malmultaj fieraj kaj fidelaj parolantoj kaj subtenantoj.
La interreto alportas ŝancon kaj rimedon al ĉinaj esperantistoj.


**Per la reto, oni povas** prezenti kaj instrui Esperanton al la publiko per malmulta kosto. En Ĉina Esperantujo aperas junaj vizaĝoj, kiuj povas bone paroli la lingvon post lernado en la reto. Uzante la reton, la parolantoj povas apliki facile la lingvon kun alilandaj esperantistoj, kio montras la valoron de Esperanto.
Krome, **en elementaj lernejoj** kaj universitatoj oni okazigas esperantajn kursojn, en kiuj estas multaj lernantoj. Sed la efika rimedo ankoraŭ estas serĉata, per kiu oni povas fari la lernantojn parolantoj post la finiĝo de la kursoj.

------

*Esperanto-Retejoj en Ĉinio*

El Popola Ĉinio:
**http//espero.com.cn**
Ĉina Radio Internacia:
**http//esperanto.cri.cn**
Esperanto-Muzeo:
**http//e-muzeo.com**
Lernado de Esperanto:
**http//elerno.cn**
Verda Reto:
**http//reto.cn**
Budhana Reto Esperantista:
**http// budhano.com**
Ĉina Instituto de Esperanto:
**http//ciesp.cn**

## Oceaniaj dioj




**B'ngudja** - dio de ŝarkoj
**Na-Maka-O** - diino de la maro
**Kanaloa** - dio de la maro

# VIRTUALA VIVO




**Klarigu al li ...**

ke lia religio estas la nulvaloraĵo, kaj la libervola memvundado ne certigos al li la lokon en la ĉielo.

## Jen senlimeco de apostatiĝo!

En Nederlando oni fermiĝos 1000 de preĝejoj




Tiel ega estas skalo de apostateco, ke preskaŭ neniu jam frekventas preĝejojn. Por dekadenco de religia kredo respondecas tiea eklezio – kaj mem konfesiĝas al tio.

Signifas tio, ke nederlandaj katolikoj devas prepari sin al venonteco sen kirkoj.

Kardinalo Willem Eijk, ĉefepiskopo de Utrecht kaj prezidanto tiea episkoparo anoncis, ke baldaŭ ĝuste 1000 de preĝejojn oni devos fermigi.
Kio estos kun ili poste ... vero estas kruela – profanoj kaj paganoj farigos vendejojn, trinkejojn, hotelojn, en kiuj vestiĝos, nutriĝos kaj dormigos homoj, kiuj en sia vivo ne toleris Jezuon.

Kaj sur ĉi-tiu loko fariĝos 1000 moskeojn.

En Svedio nur 2% da anoj de la Eklezio regule frekventas ĉiusemajne la Sanktan Diservon.





**Rapide, rapide sub la pentraĵo.**

Antaŭ ni komprenos ke …
ke ĉio estas sensencaĵo





Niĝeria pastoro **Franck Kabele** asertis, ke spertis iluminiĝon kaj dank` al la forto de sia fido povas ripeti miraklojn, kiujn faris Jesuo. Li decidis pruvi tion per irado sur akvo. Li kolektis fidelulojn en strando kaj eniris en la oceanon. Post momento li malaperis sub la akvo kal neniam plu elakviĝis.




**Kompreneble, ke Dio ekzistas.**
Ĉu vi povas pruvi Lian neekziston?
Same ekzistas: koboldoj, sorĉistinoj, drakoj, Russel tekruĉo, ktp, ktp...
Neniu pruvis ke ili ne ekzistas.!

## Afrikaj dioj



# E V E N T O J

## 2017 – LA JARO DE LA PACO

**Antoni Guterres**, eksa portugala ĉefministro, en Nova Jaro transprenis devojn de nova ĝenerala sekretario de UN. En la ĉeoka-za mesaĝo li diris, ke lia deziro estas por ke danke al la peno de la internacia komunumo la jaro 2017 estu „jaro de paco”.

*Ŝajnas, ke la portugalo tre miriĝos.*

## SEN ELEFANTA OSTO

Agentejo X anoncis, ke Ĉinio ĝis la fino de 2017 ĉesigos prilaboron kaj komercon de la elefantaj ostoj. Komence estos fermitaj 34 firmaoj, okupiĝantaj pri prilaboro de la ostoj kaj 143 foiroj specialigitaj pri ties vendo. Parto de ili estos fermita jam marte, la aliaj ĝis la fino de decembro 2017. Ĉinio estas la plej granda mer--kato de la elefanta osto en la mondo. Tiu krudmaterialo estas en Ĉinio tre serĉata, ĉar ĝi atestas pri alta socia statuso; unu kilogramo kostas ĝis 1,1 milojn da usonaj dolaroj. Ĝis nun la ĉinaj registaroj defendis rajton prilabori la krudmaterialon, asertante, ke tio estas parto de la kultura heredaĵo, sed sub kovrilo de laŭleĝa agado oni priaboradis kontrabanditan krudmeterialon. Oni taksas, ke la monda merkato de la elefanta osto valoras hodiaŭ 10 miliardojn da usonaj dolaroj kaj riĉigas mafiojn, kaj la afrikaj ĉefoj de ribelintaj grupoj.

*Ĉu vi volas komparon? Tio egalas al malpermeso en Eŭropo vendadi la orajn ornamaĵojn. Niaj virinoj tutcerte laŭte protestus.*

## 1 (UNU) MILIONO DA PLI

Post la finiĝo de politiko pri unu infano **en Ĉinio** naskiĝis unu miliono da infanoj pli, kvankam Ĝeneralĉinia Komisiono pri Sano kaj Planado de Familio prognozis ok milionojn de aldonaj naskoj jare. La komisiono plu reglamentas naskojn, ĉar Ĉinio ne rezignas pri tiu kontrolo. La Komisiono taksis, ke plimulto el 90 milionojn da paroj, kiuj povus profiti la permeson, faros tion. Laŭ la enketo de Ĝeneralĉina Virinfederacio, 53% de gepatroj ne planas la duan infanon. Multaj paroj ne volas pli da infanoj pro financaj kaŭzoj. Komisiono pri Planado de Famiio konvinkas, ke se la ĉina ekonomio ne volas perdi sian vitalismon, ĝis la 2050 devus naskiĝi 30 milionoj da aldonaj personoj.

*Sed pli grava afero, ke en Ĉinio estas ĉ. 100 milionoj pli da junuloj ol junulinoj.* **Kion fari?** *Aŭ permeso (eĉ neoficiala) por kelknombra geedziĝo ekz. unu edzino kaj kelkaj edzoj, aŭ... (milito, ĉu?)*

## HOLLANDE PREMIIS

**Francisko Hollande** enmanigis la francajn ordenojn de la Honora Legio kaj Naciaj Ordenoj de Meritoj al fajrobrigadistoj, kuracistoj kaj civiluloj provantaj haltigi teroriston, kiu la 14-an de julio enveturis per kamiono homamason en Nico, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj helpadis al la viktimoj. Resume oni honorigis 22 personojn. Ili ĉiuj riskis sian vivon por savi la aliajn.

*Eble tiu Francio ankoraŭ ne ĝis la fino estas perdita?*

## PREZIDENTO. JURISTO KAJ EKZEKUTISTO

**Rodryk Duterte**, la prezidento de Filipinoj anoncis, ke estinte urbestro de la urbo Davao, forĵetis el la fluganta helikoptero ĉinon, suspektitan pri murdo kaj agnoskis, ke estas preta same fari kun koruptemaj oficistoj. Kelkaj filipinaj senatanoj avertis lin poste, ke tiuj liaj eldiroj povas esti uzataj por komenci procedon forigi lin el la posteno de prezidento. De la momento de elekto Duetere kiel prezidento batalas kontraŭ vendado de drogoj kaj kontraŭ drogemuloj; en tiuj bataloj laŭ oficialaj donitaĵoj, estis mortigitaj jam pli ol 2 milojn da personoj kaj 3 milojn senspure estis pereiĝintaj en neklarigitaj cirkonstancoj.

*Tiu konduto kontraŭ koruptemaj oficistoj plaĉas al ni!*


## SEN AZILO ONI NE PAGOS

La germana Ministerio pri Internaj Aferoj pligrandigos en la ŝtata buĝeto je 150 milionojn da eŭroj sumon por pago de rekompenco al tiuj enmigrintoj, kiuj estinte sen ŝancoj ricevi azilon, decidiĝos libervole forlasi la landon. En la pasinta jaro profitis tiun rekompencon je 4 milojn da eŭroj 55 milojn da personoj. La Ministerio planas ŝanĝi regulojn kaj lokigi en portempaj arestejoj tiujn enmigrintojn, kiuj ricevis verdikton pri ekzilo. Persono, kiu libervole konsentos forveturi antaŭ ol lia peto pri azilo estos analizita, ricevos monon por establi entreprenon en la propra lando. Ju pli frue la fremdlandano anoncos la volon forveturi des pli grandan sumon li ricevos.

Majaaj dioj



# POLITIKO



















Egiptaj dioj



# GRAVAJ DEMANDOJ

*Kara:*
*Mi estas Etsuo Miyoshi elJapanio.*
*Mi volas antaŭenigi la E-movadon, kiel estis la deziro de Ludoviko.*
*Mi skribis artikolon por la revuo Esperanto kiel aneksite, sed ili ne aperigos. Bv legi ĝin kaj respondi la subajn punktojn kaj doni vian opinion ene de semajno.*
*Kolektinte la rezultojn, mi analizos ilin kaj poste informos tion al UEA kaj la amaskomunikilojn en E-ujo kaj en la mondo.*
*Kore,*
**Etsuo Miyoshi**
e.miyoshi@swany.co.jp

*Bv konservi nur vian elekton*:

1- Ĉu aperigi mian artikolon en la revuo Esperanto?
**Jes / Ne / Sindeteno**
2- Ĉu aperigo de ĵurnalaj anoncoj?
**Jes / Ne / Sindeteno**
3- Ĉu transloki UEA al Bruselo?
. **Jes / Ne / Sindeteno**
4- Ĉu transigi servojn kaj produktojn de UEA al malpli kosta lando?
**Jes / Ne / Sindeteno**
5- Via opinio...

**Kiel konduki la E-Mondon?**
La usona filozofo T. Pogge asertis, ke konante pri maljusta angla dominado de riĉaj landanoj, alpuŝi la anglan al la mondo samas al murdo kaj ŝtelado, rajto pri uzurpo al malriĉaj landanoj, devas esti urĝega temo por reformi en la nuna mondo. La belga politikerudito Ph. V. Parijs diris, ke nur la denaskaj angloj ricevadas komplezon, kio kreas maljustan mondon. Almenaŭ duono el la anglalandanoj devas pagi la kostojn por lernigi la anglan al neanglalingvanoj.

**Aliflanke, la kanada politika sciencisto** W. Kymlicka opinias, ke la moviĝo de EU iom post iom limiĝas pro la anglalingva elito. Estas granda risko pri neniiĝo de la demokratia bazo, se oni ne diskutas pri societo, ekonomio kaj gravaj aferoj, inkluzive de aliaj decidoj per ĉiutaga lingvo.
La lingva erudito **R. Phillipson**: Forlasinte siajn koloniojn, Anglio kaj Usono profitis per politiko kaj komerco, kio rezultis en havado kaj antaŭenigo de hegemonia pozicio por la angla per nacia strategio! 1993: pro Internacia Mona Fonduso kaj ĝiaj financaj kondiĉoj oni devis ŝanĝi la edukadon de la svahila al la angla, ktp.

**Diversaj gravuloj** jam konscias, ke la angla dominado ne bonas, tial necesas strategio por trafe kontraŭstari.

Bonŝance E-mortintoj heredigis al UEA por la diskonigo de la Movado! Ni respektu ilian volon. Ŝancoj por esti aŭskultitaj ekzistas. Ni povas aperigi nacilingve 10-foje tutpaĝe la saman anoncon en la plej prestiĝaj ĵurnaloj en ĉiu EU-lando. Tio estos ja vetado, sed se oni ne vetas, nenia renversiĝo okazos.

Plie, ni memoru, ke en 1955 UEA translokiĝis al la haven-urbo Rotterdam kaj nun trovi-ĝas en donacita domo. Ĉu ne venis jam tempo nin demandi, ĉu efektive havenurbo estas la plej ĝusta loko por la sidejo de nia Movado?

**Bruselo estas la ĉefurbo** fakte de EU. Ĝi estas efektive la plej trafa loko por lobiado antaŭ diversaj politikaj instancoj de EU kaj ankaŭ ĉe NRO'j. Por profiti je tio, ne sufiĉas nur fojaj vizitoj al Bruselo, sed daŭre restadi tie kaj forte aktivi en la ĝusta loko. Eblecoj por renversigo de la monda ordo ekzistas kiel supre dirite, aŭ ĉu ni ĉiuj senesperiĝis kaj agas kiel hobiistoj?
**Konsiderante nian nunan** forton, sufiĉus malgranda oficejo kun minimuma stabo: direktoro kaj sekretario. La aliajn servojn kaj produktojn de UEA oni transigu al landoj, kie kostoj estas konsiderinde pli malaltaj.
**Jen nur kelkaj ekzemploj (en la tabelo):**

| Minimumaj salajroj | Poŝto ĝis 50 gr. | Vivkosta Indekso |
|---|---|---|
| Nederlando EUR 1501 | EUR 2,50 | 167 (Rotterdam) |
| Pollando EUR 430 | EUR 1,22 | 38,53 |
| Brazilo EUR 219 | EUR 1,47 | 38,88 |
| Ukrainio EUR 48 | EUR 0,50 | 28,56 |

Aĉeto de plia domo en Rotterdam pli enradikigos nian Asocion tie kaj malfacile eblos moviĝi. Nun estas decida tempo por Bruselo kaj por bona utiligo de nia mono! Ni kune realigu la ludovikan revon! ... aŭ ĉu dormigi la monon en banko estas pli saĝe?

**Etsuo Miyoshi**

Celtaj dioj




# SANKTAJ OBSCENAĴOJ














Indianaj dioj




**Manituo** - ĉefa forto penetrema la tutan naturon (ne-dio!);

# KIEL ŜANĜIĜIS DEKALOGO

Ne ĉiuj scias, ke **dekalogo** sonis iam alie ol nuntempe. Homoj, precipe katolikoj, ŝajne kredas ke tiu kolekto de „diaj instruoj kaj malpermesoj" estas hodiaŭ konata precize samforma kiel ĝi estis skribita antaŭ centoj da jaroj.

## Malpermeso krei portretojn de dio „envia", kiu punos infanojn por pekoj de iliaj gepatroj

Komparu ni do du el inter diversaj versioj de dekalogo el malsamaj - sed oficialaj - biblioj: *(nigre - malnova versio de biblio; ruĝe - relative nova versio biblio)*

**1. Vi ne havos aliajn diojn <u>OL</u> mi**
**1. Vi ne havos fremdajn diojn <u>KROM</u> mi**

La unua ordono ŝajnas simili en ambaŭ tradukoj kaj la ŝanĝoj povus efiki pro fluo de tempo kaj malprecizeco de tradukoj de la originala teksto.

Sed poste ni havas la duan ordonon:

**2. Vi faros nek statuon nek bildon de tio, kio estas alte sur la ĉielo, aŭ malalte sur la tero, aŭ en akvo, pli malalte ol la tero. Vi nek riverencos nek servos por ili. Ĉar Mi estas Sinjoro, Via Dio, Dio envia, punanta filojn en la tria kaj kvara generacio, pro malvirtojn de la patroj – tiujn, kiuj malamas Min, sed kiu montras gracon en la mila generacio por tiuj, kiuj min amas kaj observas miajn ordonojn.** (La ordono forigita en la jaro 725).

**2. Vi ne prenos vane la nomon de Sinjoro Dio.**



Pro kio tiel drasta mallongigo kaj ŝanĝo en la enhavo de la ordono? En originalo tiu ordono malpermesis krei similaĵojn de dio kiel statuoj aŭ bildoj. Ĝi ankaŭ estis kontraŭ ideo starigi ĉevojajn kapeletojn aŭ figuretojn. Oni forigis maloportunajn fragmentojn, anstataŭante ilin nur per malpermeso uzi vorte la nomon de dio, kiu fakte aperadis en la tria ordono. Interese, ke islamanoj ĝis nun uzas la originan version de tiu ordono (ili ankaŭ opinias, ke Tora estas unu el la sanktaj libregoj), kio efikas kiel malpermeso krei bildojn ekzemple de la profeto Muhamado.
Kaj plu...

**„Mi estas Sinjoro, via Dio, Dio envia, punanta filojn en la tria kaj kvara generacio**",

... tiuj vortoj ne prezentas dion en bona lumo laŭ vidpunkto de la nutempa moraleco – envia dio, punanta infanojn kaj nepojn pro la krimoj de iliaj patroj.

**3. Vi ne prenos/uzos la nomon de Sinjoro, via Dio por la aferoj vantaj, ĉar ne permesos Sinjoro, por restus senpuna tiu, kiu prenas Lian nomon por la aferoj vantaj.**
**3. Memoru, por ke vi la sanktan tagon solenu.**

En la originala tria ordono aperas la dua ordono de la nuntempa traduko. Post la forigo de la vera dua ordono oni devus tamen plenigi ekestintan breĉon – oni enskribis do la trian ordonon kiel la duan ordonon. Tio kaŭzis mankon de la tria ordono, kiun oni plenigis per nova enhavo, tiufoje prenita de la kvara ordono ktp. Fine oni faris du ordonoj dispartigante je du ordonoj la dekan ordonon. Tiamaniere nombro de la ordonoj estis korekta malgraŭ forigo de unu el la originaj ordonoj.

## Dio aprobas sklavecon

Verŝajne plej terura ŝajnas esti la origina teksto de la kvara ordono (en la posta versio enskribita kiel la tria ordono pro forigo de unu el la ordonoj en la antaŭa alineo):

**4.Vi donas atenton por ŝabato, por festi ĝin kiel ordonis Sinjoro, Dio via. Dum ses tagoj vi laboros kaj plenumos ĉiujn neprajn laborojn, sed la sepan tagon estas ŝabato de Sinjoro, Dio via. En tiu tago plenumos**

al la paĝo 15

Barataj dioj




**Brahmao** - ĉefdiokreisto en hinduismo, kaj kune kun la aliaj dioj Viŝnuo kaj Ŝivo parto de la Trimurtio, en kiu Brahmao rolas la principon de la kreado;
**Ganeŝo** - unu el la dioj plej konataj el la hindaj gedioj; patrono de la artoj kaj sciencoj;
**Indro** - ĉefa dio de la antikva veda religio, fariĝis la reĝo de la dioj kaj sinjoro de la ĉielo;
**Ŝivo** - personiĝo el absoluteco, la detruanta kaj samtempe rekreanta deveno de la tutmondo, disdonante mortiĝon kaj renaskiĝon

# Resumo de la jaro 20





Kiom da eventoj vi suk

# 016 en unu desegnaĵo




cesis rekoni en la bildo?

# S T A T I S T I K O J




Akcepto de evoluteorio




Ĉinio kaj Usono respondecas pri 45% de tutmonda atmosfera poluado




Posedantoj de firmaoj

**Volkswagen** Audi, Bentley, Bugatti, Lamborghini, Porsche, SEAT, VW, Skoda
**Toyota** Daihatsu, Lexus, Scion
**General Motors** Buick, Cadillac, Chevrolet, GMC, Holden, Vauxhall, Opel
**Ford** Lincoln, Troller
**Renault Nissan** Renault, Nissan, Infiniti, Dacia, Datsun, Renault Samsung, Lada
**Hyundai Motor Group** Hyundai, Kia
**Daimler** Mercedes-Benz, AMG, Smart
**Fiat Chrysler Automobiles** Alfa Romeo, Chrysler, Dodge, Ferrari, Fiat, Jeep, Lancia, Maserati, Ram Trucks
**Honda** Acura
**BMW** Mini, Rolls-Royce
**Suzuki** Maruti Suzuki
**PSA** Peugeot Citroën Peugeot, Citroën, DS
**Tata Motors** Tata, Tata Daewoo, Jaguar, Land Rover
**Geely** Volvo
**Independent** Aston Marin, Mazda, Subaru, Mitsubishi, Tesla, McLaren

## Inuitaj dioj




**Sedno** (diino) - mara diino, estro de la marbestoj; ŝi regas Adlivun-on, la inuitan submondon, kie ŝi ankaŭ vivas; filino de la kreinto Anguto kaj sia edzino. Onidire ŝi estis tiam granda kaj malsata, ke ŝi manĝis ĉion en la domo de ŝiaj gepatroj, eĉ unu brakon de ŝia patro dum li estis dormanta; Sedno estis bela kaj ĉasta knabino kaj ke malbona birdo-spirito igis ŝin edziĝi.

# KIEL ŜANĜIĜIS DEKALOGO

el la paĝo 11

**neniun laboron nek vi, nek via filo, nek via filino, nek via servisto, nek servistino, nek via okso, nek via azeno, nek ĉiu alia besto, nek fremdulo, kiu troviĝas en via domo; por ke ripozu via sklavisto kaj sklavistino, kaj ankaŭ vi. Memoru ke vi estis sklavisto en la egiptia tero kaj elkondukis vi de tie Sinjoro, Dio via, per forta mano kaj etendita brako; do ordonis Sinjoro, Dio via, gardi la tagon de ŝabato.**

**4. Memoru, la sanktan tagon festi**

En la ordono ripozi la sepan tagon estus nenio terura. Sed inter nombrataj homoj, kiuj rajtas ripozi la sepan tagon aperas ankaŭ „via sklavo kaj via sklavino” . La aŭtoro de tiuj vortoj ne nur scias pri ĝenerala kutimo posedi gesklavojn fare de disĉiploj de la dekalogo, sed ankaŭ permesas tion. Postulas nur por liberigi ilin dum unu tago en semajno de la sklava laboro. Pro kompreneblej konsideroj la Katolika Eklezio devis forigi tiun fragmenton sankciigatan sklavecon, kiel ion normala kaj morale ĝusta.

Mencio pri sklavoj aperas tamen ne nur en tiu ordono:

**X. Vi ne deziregos la edzinon de via proksimulo. Vi ne deziros domon de via proksimulo nek lian kampon, nek lian sklavon, nek lia sklavinon, nek lian okson, nek lian azenon, nek ĉiu alia aĵo, kiu apartenas al li.**

**IX. Ne deziregu edzinon de via proksimulo.**

**X. Nek alian aĵon, apartenanta al li.**

Tiufoje oni sagace preterpasis sklavistoj, kalkulante ilin kune kun oksoj, azenoj kaj kampoj kiel „aĵo, kiu estas lia”.

## Dio permesas mortigadi?

Valoras atenti pri ankoraŭ unu demando. Originala hebrea „Lo tircach” aperanta en Tora signifas „ne murdu”. La vortoj „ne mortigu” estus „Lo taharog”. Kiam ni pli atente legas la Malnovan Testamenton, ni tuj rimarkas, ke tia, kia ĝi estas nun, estus sensenca – la malnovtestamenta dio multfoje ordonadis murdadon de malamikoj, eĉ murdado de ĉiuj urboloĝantoj inkluzive kun virinoj kaj infanoj. Versio „ne mortigu” estas laŭvica adaptigo de la originala teksto tiel, ke ĝi konformu al la nuntempa spiritostato kaj moraleco tiel diferenca de la malnovaj konvinkoj kaj la originala versio de la dekalogo.

Jen la aliaj ordonoj por kompari:

**V.Estimu vian patron kaj vian patrinon tiel, kiel ordonis Sinjoro, Dio via, por ke vi longe vivu, por ke vi bone prosperu kun la kampo kiun donas al vi Sinjoro, Dio via.**

**IV.estimu vian patron kaj patrinon.**

**V.Ne mortigu.**

**VI.Vi ne mortigos**

**VI.Ne adultu.**

**VII.Vi ne adultos.**

**VII. Ne ŝtelu.**

**VIII.Vi ne ŝtelos**

**VIII. Ne mensogu kontraŭ via proksimulo.**

**IX. Kiel atestanto vi ne mensogos kontraŭ via proksimulo.**

## Kio do restis el la originalo?

Oni devas agnoski ke ne multe. Oni ŝanĝadis ne nur unuopajn vortojn kaj kuntekstojn – oni trastrekis la tutajn frazojn (kaj eĉ la tuton de unu el ordonoj), oni dispartigis kaj traŝovadis unuopajn ordonojn, oni forigadis iliajn kernajn fragmentojn. Unuflanke tio ŝajnas ŝoka kaj nekomprenebla – kiel tiel grava fragmento de la Malnova Testamento kiel dekalogo povus esti tiel multe transformita?

Aliflanke ni devas tamen kompreni, ke tio estas nur kolekto de reguloj skribitaj de homoj vivantaj en realaj tempoj, en reala loko de la Tero. Ĝi rilatas al ilia maluniversala moraleco, kiun hodiaŭ praktike neniu akceptus (ke ni nur menciu sklavistoj). Ĝi okupiĝas pri iliaj problemoj, substrekas aferojn, kiujn ni hodiaŭ preterlasus kiel oksoj kaj azenoj, ne mencias ankaŭ pri problemoj, kiuj aperis en la nuntempa mondo kaj ne ekzistis en tiamaj tempoj. Ĉion ĉi Eklezio provas nun „korekti” ĵonglante kaj pli kaj pli modifante la originan tekston, kiun oni malfacile trovas en ĉiam pli novaj versioj, aperantaj senhalte ĝis nun (ke ni menciu eldonitan lastatempe t.n. „Novan Kateĥismon” , kiu tamen ĝis nun ne plene estas akceptita).

La dekalogo estas kiel libro, al kiu laŭvicaj papoj dum jarcentoj enkondukadis siajn „eldonejajn korektojn”, por alĝustigi ĝin al ŝanĝanta homa moraleco.

Persaj dioj



# V E R A   V I V O




Esploroj trovis, ke post interago kun bela virino ĉe viro falas por nelonga tempo mensa lerteco



**42% de britaj geedzparoj eksgeedziĝas.**

Laŭ raporto de ONS



Dum orgasmo la cerbo sekrecias tiom da dopamino (t.e. dopanta substanco), ke la testo de esploro pri la aktiveco similas la personon kiu estas sub la influo de heroino.




**Masturbado estas sana.** Ĉe viroj malgrandigas la riskon de la prostata kancero kaj ĉe virinoj malgrandigas la riskon de la inflamo de utera cerviko.




La persa reĝo Artakserkso la 2-a havis 365 da konkubinoj (po unu ĉiutage). La konkubinoj naskis por li 115 da filoj.




Meze 6-foje dum la jaro ni salutante manpremas la personojn kiuj ĵus antaŭ nelonge sin masturbis kaj ne lavis la manojn.

## Slavaj dioj



# Kial Usono fariĝu JAPANIO

de Barry Friedman

**Ili estas libere haveblaj**. Mi ne estas aparte lerta kun la aŭto. La aŭto kaj mi estas havinta militon je menskapablo ekde kiam mi havis 16 jarojn kaj mi estis devigita kompreni la mo-vadojn de veturado en ĉi tiu aŭto-obsedita kaj kristanism-ŝarĝita socio, en kiu bedaŭrinde mi plenkreskis kaj edukita per fervoraj, kapitalism-pelitaj, morale malplenaj gepatroj kaj tia familio. La puŝo estas fariĝi advokato. Kuracisto. Demokratiano. Liberalulo. Puŝi por la Israela enloĝiĝado de palestina lando kaj elradikigo de pale-stina popolo. Puŝi por pli da asistismo por la senhavuloj kaj subpremataj malplimultoj de la Usono. Perlabori pli da 100,000 dolaroj pojare, aceti la antaŭurban domon. Posedi la Toyota-on, la Subaru-on, la Honda-on, la Ford-on, la Dodg-on, la Chevi-on, limuzinon, la Chrysler-on. Daŭrigu vojaĝojn al Novjorko por vidi Tajmskaron kaj Brodŭaj-aj spektakloj kun Nathan Lane kaj Hugh Jackman kaj Tom Hanks. Vidi la strangajn enmigrintojn el triamondaj landoj en Afriko kaj Latin-Ameriko kaj la Proksima Oriento, kiuj inundas la stratojn kun siaj sensencaĵaj lingvoj. Kio estas la araba krom kriado kaj "La La La Alaho La La La"? Kio estas la somala krom lang-alklakaj bruoj? Kio estas la hispana krom rapida mitral-batalado pri la ne-respondita amo de iu virino nomita Maria sur televido?

**Jen mi, meznombra alteco**, meznombra pezo, la ĉiu-Amerika blankula masklo kiu ne lasas sin esti premplatigitaj malsupren per la fermita menseco de kristanismo. Ne, Jesuo ne estis la Filo de Dio, la Sinjoro, eble li estis nur homo, kiu havis grandegan kvanton de karismo kaj povis influi la masojn de juda popolo sekvi siajn instruojn. Rabeno kiu vekis la Fariseojn sub Caiaphus-o por timi judan ribelon kontraŭ la Romia Imperio je tiu tempo, kaj estis tial krucumita kiel ago de politika preteksto. Nenio religia, nenio spirita, teologia, teozofia, filozofia, ĉiela, ĉielglora. Viro de sia tempo, marioneto de sorto, dorno sur la branĉo de aĉa historio. Mi rifuzas iri kune kun la plimulto de la usonanoj kiuj estas cerbo-lavitaj per tiu sensencaĵo. Hodiaŭ estas tago de pliakutigo pri aŭtoj, teknologio, ĉel-telefonoj, nekompetenta burokratismo, montet-homaĉoj, pseŭdo-intelektaj judoj kiuj asertis ke ili legis ĉiujn Saul Bellow-on, Isaac Bashevis Singer-on, Bernard Malamud-on, Sholem Alechem-on, la Malnova Testamenton en la originala hebrea, Amos Oz-on, Aharon Applefeld-on, la paroladojn de Benjamin Netanjahu-o, David Ben Gurion-on, Itzhak Rabin-on, rabeno Akiva-on, Moseon, Maimonides-on. Sed efektive ili estis perditaj je la postkurado al ne-judaj belvirinoj en senfina serĉo de malpleneco. La blonda ĝentila plaĉa virino en la vakera ĉapelo kaj blankaj angoraj sveteroj kaj botoj, kiu estos afabla kaj kvieta kaj faros, ke oni sentas sin kiel tiu fariĝis vera usonano. Ne plu pri la juda enmigrinta mizero, sur la ŝipo eskapante la pogromoj, vivante en malriĉeco en Nov-Jorka aŭ Ĉikaga loĝaĉejo kun miloj de aliaj, kunuzante banĉambro kun ĉiu familio, kriante en la jida aŭ en tre malbone-parolata angla pri manĝaĵo, vestoj, kies turno nun kaki, viŝi, iri al la buĉisto, ne la pork-buĉisto sed la koŝer-buĉisto, la ĉina lavejo, la itala bakejo, uzu la metron iri al la fabrik-laboro en Manhatano, skribi leteron en la jida al la Malnova Landa, in der heim, a la pais original. Ekzistis ĉiam Hispania najbaroj en ĉi tiuj areoj de Novjorko.

Miaopinie - noveleto plaĉis al ĉiuj. Neniu plendo. Tial ĝi estos daŭrigota.

Japanaj dioj




# K O N S I L O J



Por ke purigi akurate mansaketon de amasigataj eretoj kaj de aliaj malpurigoj - vi antaŭe ĝin batpurigu, kaj poste traktu per vestoruleto.




En glaciŝranko NE konservu: citrinojn, verdajn citronojn, pampelmusujojn, grapfruktojn kaj tomatojn. Ĉi tiuj fruktoj kaj legomoj perdas siajn aromatojn kaj gustojn en malvarmaj temperaturoj.




Ĉu vi havas klopodon por ke deglui algluaĵon? Vi trempiĝu peceton de viŝtuko en aceto kaj almetu al algluaĵo. Post kelkaj minutoj la algluaĵo devas deglui pli facile.




Baku plastro de flava fromaĝo en fornokesto. Post malvarniĝo estos frandaj krakenoj por aranĝo.




Al akvo en florvazo aldonu 3 kulerojn de sukero kaj 2 kulerojn de aceto. La floroj vivos pli longe. Memoru por ke tranĉi stipojn kaj ĉiutage renovigu akvon.

## Ĉinaj dioj






| viro | virino |
|---|---|
| Li kokras | Ŝi travivas amaventuron |
| Li eksedziĝante, rompas familion | Ŝi finas geedzecon sen perspektivo |
| Li turmentas proksimulojn | Ŝi dereagas streĉon |
| Li kriegas | Ŝi akcentas sian pravecon |
| Li bategas infanojn | Ŝi fariĝas kolera |
| Li malzorgadas familion | Ŝi aktiviĝas profesie |
| Li estas malspritulo | Ŝi iafoje estas perdita |
| Li estas maldelikatulo | Ŝi iafoje devas esti asertema |
| Li estas Ŝvitlaboristo | Ŝi zorgas pri sia sendependenco |
| Li pigras | Ŝi restauras sian potencon |
| Li mensogas | Ŝi aplikas diplomation |
| Li malŝparas monon | Ŝi devas de tempo al tempo aĉeti ion por si |
| Li - se bone aspektas - estas narcisismulo | Ŝi estas prizorganta - simple dirante |



Finnaj dioj



# DIINAJ KARIKATUROJ



















Turkaj dioj



# FREŜA MAGIA KVADRATO

nur por tiuj, kiuj ŝatas pensi ! aliaj - lasu ĝin

1. reago post spritaĵo...................
2. trankvila kaj naiva agrabla travivaĵo..................................
3. respekto antaŭ plejaltulo.........
4. ĝardena rigardejo kun tegmento
5. virino adorata .........................
6. religia movado en Japanio.........

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | |
| 2 | | | | | | |
| 3 | | | | | | |
| 4 | | | | | | |
| 5 | | | | | | |
| 6 | | | | | | |

## Kiumaniere vi solvos krucvortenigmon

Vi devas elŝuti retrevuon al komputilo, ĉar nur tiam estos ebleco solvi magian kvadraton !

Por ke solvado estu pli klara - enskribu majuskle literojn!
Per muskursoro (sageto) vi eniru kvadrateton kaj musk-laku ĝin per maldekstra puŝbutono.
Enskribu ĝustan literon de la vorto kaj iru al sekva kvad-rateto. Enskribu sekvan literon kaj iru ... ktp, ktp.
Por kontroli ĝustecon de magia kvadrato -
iru al la lasta paĝo... SED...
**Unue vi devas iomete pripensi...**





Inkaj dioj





# SENVORTE
























Filipinaj dioj



# J U D A  V I V O

**Enkonduko:**
Pri la juda patrino multas la anekdotoj kaj ŝercoj. Multfoje ŝi estis terura, pro trozorgemo al la infanoj, pro troigita deziro ke ili sukcesu en la vivo (fenomeno konata ĉe minoritatoj...) ktp.



**Juda patrino**
Juna juda viro diris al sia patrino: “Panjo, mi decidis edziĝi. Pro la amuzo mi venos vespere al via hejmo kun tri miaj amikinoj kaj petos de vi diveni kiun el ili mi elektis por edzino.”
La patrino konsentis.
Vespere la filo alvenis kun tri ĉarmaj fraŭlinoj. Post la manĝo li demandis: “Nu, Panjo, kiu estas mia fianĉino?”
“La rufharulino”, respondis tuj la patrino.
“Nekredeble! Kiel vi sciis tion?”
Respondis Panjo: “Ĉar mi jam ne toleras ŝin…”

**Muŝo kaj Mojŝe**
Kvar samideanoj - ĉino, anglo, ruso kaj judo - eniris la kongresejan kafejon "La Verda Sensoifejo" kaj mendis verdan teon.
Baldaŭ ili ricevis po unu tason da teo kun... muŝo ene de ĉiu taso.
- La ĉino tuj manĝis sian muŝon kaj poste trinkis sian teon.
- La anglo tute rifuzis trinki sian teon.
- La ruso forĵetis sian muŝon kaj poste trinkis sian teon.
Nun divenu kion faris la judo?
Li zorge elglasigis sian muŝon kaj... vendis ĝin al la ĉino!

**Heredaĵo**
Tre riĉa Usonano festis sian 95-jaran datrevenon. Li invitis al sia hejmo siajn tri plej proksimajn amikojn: katolikon, protestanton kaj judon. Ĉeestis ankaŭ lia advokato.
Li anoncis al ili jene: "Mi deziras heredigi al vi po <u>cent **milionoj**</u> da dolaroj. Sed mi havas unu kondiĉon: Dum mia enterigo ĉiu el vi devos meti en mian ĉerkon <u>**100 mil**</u> dolarojn. Tio estos pruvo, atesto, kiu montros ke vi fidas min.
Post kelkaj monatoj li forpasis. Ĉe la tombo, sub la strikta kontrolo de la advokato, la katolika amiko enĉerkigis cent mil dolarojn kontante. Same faris la protestanto.
Tiam venis la judo, elprenis de la ĉerko la ducent mil dolarojn kaj enĉerkigis anstataŭe ĉekon je la sumo de tricent mil dolaroj.

**Marĉando**
Patro kaj filo, judaj komercistoj de la orienteŭropa vilaĝo, aĉetas varojn en la metropolo. La filo, vidante ke lia patro marĉandas kun la vendisto kaj akre diskutas kun li pri ĉiu groŝo, demandas:
"Paĉjo, kial vi marĉandas tiel longe? Ja mi kaj vi scias, ke vi tute ne intencas honorigi la ĉekon kiun vi donos al ili."
Respondas la patro: "Filo, mi estas honesta homo kaj pro tio mi klopodas malgrandigi lian perdon."

**F i l o**
Dum sia tuta vivo rabeno Jehoŝua estis tre pia kaj religiema, kaj tute nature post sia morto li eniris la ĉielon, kie li estis akceptita kun granda ĝojo. Sed anstataŭ ol ĝoji li eksidis, kovris sian vizaĝon per la manoj kaj rifuzis partopreni la feston. La anĝelaj penoj konvinki lin malsukcesis kaj fine li estis invitita antaŭ la trono de Dio la Eternulo mem.
"Karulo", aŭdis la la rabeno profundan voĉon. "Estas menciite ĉe mia listo ke vi ĉiam vivis laŭ miaj ordonoj, do kial vi rifuzas feston je via honoro?"
Rabeno Jeoŝua klinis sian kapon kaj diris: "Mi ne meritas ĝin. Iel mia vivo estis fuŝita, ĉar kvankam mi ĉiam penis subiĝi al via Dekalogo, tamen mia filo forlasis nian religion kaj fariĝis kristano."
"Ankaŭ la mia!" venis simpatia profundvoĉa respondo.

**Svatisto**
Juda svatisto venas al la malriĉulo kaj diras: "Mi volas aranĝi geedziĝon al via filo."
La malriĉulo respondas: "Mi neniam enmiksiĝas en la vivon de mia filo."
La svatisto respondas: "Sed la knabino estas la filino de la pariza milionulo Rotŝild."
La patro diras: "Ho, en tiu okazo…"
Poste la svatisto iras al S-ro Rotŝild:
"Mi havas judan edzon por via filino."
"Sed mia filino estas tro juna por geedziĝi."
"Sed tiu junulo jam estas vicprezidanto de la Monda Banko..."
"Ho, en tiu okazo…"
Fine la svatisto iras al la prezidanto de la Monda Banko.
"Mi havas por vi junan kandidaton al vicprezidanto."
"Sed mi jam havas pli da vicprezidantoj ol bezonate."
"Sed tiu junulo estas la bofilo de Rotŝild."
"Ho, en tiu okazo…"

nordĝermanaj dioj



# En la jaro 2016

Naskiĝis ~ 143 milionoj da infanoj
Mortis ~ 60 milionoj da homoj + oni faris 42 milionoj da artefaritaj abortoj

**El kiuj:**
Rezulte de la kontaĝ-malsanoj ~ 13 milionoj
Pro la kancero ~ 8,2 milionoj
Pro la fumado de cigaredoj ~ 5 milionoj
Pro la troa uzado de alkoholaĵo ~ 2,5 milionoj
Pro la aidoso ~ 1,7 milionoj
Pro la trafik-akcidentoj ~ 1,35 milionoj
Pro la memmortigoj ~ 1 miliono
Pro la malario ~ 1 miliono
Pro la toksigita akvo ~ 0,8 miliono
Dum la akuŝado ~ 0,3 miliono

**Ni aldonu, ke** mortis ~ 7,6 milionoj da infanoj dum la aĝo de 0 ĝis 5 jaroj, kaj ĉiutage ĉirkau 22 mil da homoj mortis pro la malsato.
Oni senarbigis (fortranĉis) ~ 5,2 milionoj da hektaroj de arbaroj
Aperis novaj dezert-terenoj ~ 12 milionoj de hektaroj
Erozio ~ 7 milionoj da hektaroj de la supraĵo de Tero
Poluado de la atmosfero per industriaj fumoj (medimalpurigo) ~ 12 milionoj da tunoj de toksaĵoj (kemiajhoj)
La homaro ellasis ~ 37000 milionoj da tunoj de karbona dioksodo (CO2)

**Oni produktis:**
Komputiloj ~ 212 milionoj
Bicikloj ~ 144 milionoj
Aŭtomobiloj ~ 75 milionoj

**Ĉiutage oni vendadis:**
Televidiloj ~ 470 miloj
Gazetoj ~ 350 milionoj
Porteblaj telefonoj ~ 4 milionoj

**Ĉiutage oni elspezis:**
Por la sanstato ~ 8 miliardoj da dolaroj
Por la publika edukado ~ 7,1 miliardoj da dolaroj
Por la armado ~ 3,5 miliardoj da dolaroj
Por la narkotaĵoj ~ 1 miliardo da dolaroj
Por la video-ludoj ~ 0,15 miliardo da dolaroj
La Intereton uzis ~ 3,5 miliardoj da homoj

**Ĉiutage:**
Oni elsendis ~ 165 miliardoj da ret-mesaĝoj
Oni uzis la Guglo-serĉilon ~4,6 miliard-foje
Oni elsendis ~ 0,4 miliardoj da Tviteroj
Oni publikigis ~ 3 milionoj da blogoj

**Oni eluzis ĉiutage:**
Elektro-energio ~284 milionoj da megavatohoroj (MWh), kaj el tio:
el la nerenovigeblaj energi-fontoj ~ 230 milionoj da megavatohoroj (MWh)
el la renovigeblaj energi-fontoj ~ 54 milionoj da megavatohoroj (MWh)

**Oni pritaksas, ke:**
Petrolo sufiĉas je ~ 46 jaroj
Tergaso sifiĉas je ~ 161 jaroj
Karbo sufiĉas je ~ 410 jaroj

**<u>Solvo de karikaturoj:</u>**

1. Brigitte Bardot
2. Edith Piaf
3. Sophia Loren
4. Marlena Dietrich
5. Janis Joplin
6. Lady Diana
7. Marylin Monroe
8. Elizabeth Taylor
9. Josefine Baker

**<u>Solvo de magia kvad-rato</u>:**
**(sed unue pripensu !)**

**1. RIDADO**
**2. IDILIO**
**3. DIOTIM'**
**4. ALTANO**
**5. DIINET'**
**6. OOMOTO**

Mezopotamiaj dioj

